# RETKOMUNIKOJ 2/2010

ĈEA-retkomunikoj estas neregula informilo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio
sendata al ĉiuj rete atingeblaj membroj de ĈEA kaj ankaŭ al nemembroj, kiuj per ajna maniero montris intereson pri la Esperanto-movado en Ĉeĥio. Ĝi neniam enhavas aldonaĵojn. Se vi tamen ne volas ricevadi ĝin, sufiĉas respondi per simpla "ne sendadu" kaj ni tuj eligos vin de la dissendolisto.

ENHAVO:
1. Muzea nokto en Svitavy antaŭ la pordo
2. Ekotur kaj InPaSem nuligitaj
3. Konferenco de Ĉeĥa Esperanto-Asocio ĉi-jare en Poděbrady
4. Kelkaj interesaj retpaĝoj
5. Bv. aliĝi al novaj komputilaj projektoj
6. En majo 3 universitataj finstudintoj kun Esperanto-temoj
7. Ĉeĥa Esperanto-junularo aktivas (oficiala organo de ĈEJ redaktata de Marek Blahuš)
8. Kalendaro de Esperanto-aranĝoj en Ĉeĥio kaj organizitaj de Ĉeĥio

## 1. MUZEA NOKTO EN SVITAVY ANTAŬ LA PORDO

Kiel jam anoncite, la 12-an de junio okazos en Svitavy Muzea nokto, al kies programo kontribuos ankaŭ la Esperanto muzeo. Ĝia programo estos riĉa: Inaŭguro de la nova ekspozicio en la muzeo, ĉi-foje el la verko de Pavel Rak, humuristo kaj ilustristo, fama ankaŭ en Esperantujo, bapto de la lernolibro de Stano Marček „Esperanto přímou metodou“, la fama lernolibro, kiu jam aperis en 24 lingvoj (Ĝin partoprenos kaj la aŭtoro, kaj ilustristino Linda Marčeková, kaj la tradukisto ĉeĥen Max Kašparů. Baptopatrino fariĝos Jana Melichárková, ĈEA-prezidantino kaj aŭtorino de duvoluma lernolibro de Esperanto por infanoj.) Krome oni baptos ankaŭ la Kristnaskajn demandojn kaj paradoksojn de Max Kašparů en traduko de Marek Blahuš. Memkomprene sekvos aŭtografado de ĉiuj nomitaj, inkluzive de Pavel Rak, kiu subskribados sian verkon „Desegnita humuro“. La lasta, sed ne malgrava, programero celas infanojn kaj nomiĝas „Desegnado de infanoj kun Pavel Rak“.
Dum ĝi li volonte ne nur malkaŝos al la infanoj la sekreton de sia arto, sed ankaŭ desegnigos ilin, kion li jam plurfoje sukcesis aliloke. Krome, interesa kultura kaj amuza programo okazos dum la tuta vespero en areo de la Urba muzeo kaj galerio tuj vid-al-vide de la Esperanto-muzeo. Certe do valoras veni ĉi-sabate al Svitavy kaj ĝui la riĉan programon. Pli da detaloj ĉe http://www.esperanto.cz/cs/akce/muzejni-noc-s-pavlem-rakem-a-krtem-e-ucebnice-301.html

## 2. EKOTUR kaj InPaSem NULIGITAJ

bv. atenti, ke kaj la Ekoturisma Renkontiĝo en České Budějovice, kaj Internacia Paroliga Semajno en Dobřichovice, devis esti nuligitaj. Pro malsamaj kialoj kaj kun malsamaj sekvoj: dum la tradicion de Ekotur oni planas daŭrigi, en 2011 tre verŝajne en Bohemia Karsto, InPaSem tre verŝajne ne plu okazos.

## 3. KONFERENCO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO ĈI-JARE EN PODĚBRADY

Ne pretervidu, ke la ĈEA-konferenco okazos ĉi-foje inter la 24-a kaj 26-a de septembro en fama kaj ĉarma banloko Poděbrady. Pri la urbo mem vi ekscios ĉe www.lazne-podebrady.cz. Novaĵo estas, ke eblas la restadon plilongigi ĝis la 28-a de septembro. Dum tiu plilongigo oni

havos okazon aŭ partopreni la prikomputilan seminarion aŭ simple ĝui la agrablan banlokan medion. Pli da informoj vi trovos ĉe http://www.esperanto.cz/cs/akce/konference-ces-299.html aŭ ĉe cea.polnicky@quick.cz

4. KELKAJ TRE INTERESAJ ESPERANTO-PAĜOJ
Esperanto tra la mondo - multaj ligiloj al diversspecaj Esperanto-paĝaroj: www.esperanto-tra-la-mondo.net
la plej granda Esperanto-katalogo en la reto: www.uea.org/katalogo
la plej granda trarigardo de Esperanto-gazetaro: www.gazetejo.org/gazetoj
la novaĵservo en Esperanto, la plej kompleksa kalendaro de Esperanto-aranĝoj, katalogo de sciencaj kaj teknikaj eldonaĵoj, virtuala ekspozicio de bildkartoj kaj multe pli: www.eventoj.hu
la plej populara malferma enciklopedio: www.eo.wikipedia.org
kaj fine (por ĉi-foje) la rekta ligilo al la plej freŝa bulteno de EEU (Eŭropa Esperanto-Unio: http://www.gazetejo.org/eo/node/2074

5. BONVOLU ALIĜI AL NOVAJ KOMPUTILAJ PROJEKTOJ
En la retpaĝo de Vladimír Türk http://www.ipernity.com/doc/35989 vi povas spekti kaj elŝuti Esperante parolatan filmon pri Zvíkov kaj instruan filmon kiel vi mem povas fari ion similan pere de la programo Windows Movie Maker.
Ankoraŭ pli facilas fari en la senpaga programo Audacity sonregistraĵojn de E-beletro kaj de aliaj interesaj tekstoj. Ekzemplon vi povas aŭskulti en http://www.esperanto.cz/cs/aktuality/audionahravka-z-capkovy-knihy-apokryfu.html.
Se vi volas ellerni kaj sekve realigi similajn projektetojn, bv. skribi al komputado@esperanto.cz. PaDv

6. EN MAJO 3 UNIVERSITATAJ FINSTUDINTOJ KUN ESPERANTO-TEMOJ
La 24-an de majo 2010 studentino Eliška Votýpková sukcese defendis sian diplomlaboron „Esperanto en Ĉeĥoslovakio 1945-1970“ (ĉeĥlingve) kaj magistriĝis ĉe la Karola Universitato en Prago, fako politologio.

La 25-an de majo 2010 Dima Ŝevĉenko defendis sian magistran disertacion pri Periodaĵoj en Esperanto ĉe prof. M. I. Isajev en Rusia Universitato de Amikeco inter Popoloj en Moskvo.

La 31-an de majo 2010 en urbo Jekaterinburg, Rusio, studentino Arina Osipova diplomiĝis pri la temo "Propedeŭtika rolo de Esperanto en lernado de la germana lingvo". Ŝi studis en la Urala ŝtata pedagogia universitato (UŜPU), instituto de fremdaj lingvoj.

7. ĈEĤA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS (oficiala organo de ĈEJ redaktata de Marek Blahuš)

Ĉeĥa Esperanto-Junularo (ĈEJ) festis la 5-an datrevenon de sia refondiĝo (la civitanan asocion registris la ministerio la 16-an de majo 2005). Jam la 13-an de aprilo rememoris ĝin per kunveno kaj torto la praga klubo de ĈEJ, poste la 12-an de majo per prelego de gasto Cesáreo GARCÍA FERNÁNDEZ pri Asturio kaj komuna vespermanĝo ankaŭ la klubo en Brno. La ĉefa solenaĵo okazis ekzakte la 16-an de majo en Kralupy nad Vltavou, kie per

turisma promeno finita de festa vespermanĝo rememoris la datrevenon 10 homoj. Festparolis la prezidanto Daniel MRÁZEK kaj unu el la refondintoj Marek BLAHUŠ. Prezentiĝis traduko de poemo de Jaroslav SEIFERT "Kralupy - nebelanta urbo" kaj ero de la preparata filmo pri la 65-a IJK en Liberec'.

Sekvan tagon en la praga monaĥejo Emauzy okazis gazetara konferenco en ĉeesto de honora gasto Max KAŠPARŮ, honora membro de ĈEJ Petr CHRDLE, prezidanto de la praga esperanto-klubo Jiří PATERA kaj la menciitaj Daniel MRÁZEK kaj Marek BLAHUŠ. La novaĵagentejo ČTK aperigis tiuokaze agentejan komunikon: http://magazin.ceskenoviny.cz/zajimavosti/zpravy/477858 Ĝin transprenis ekz. la retejo Novinky.cz. Pri esperanto oni trifoje parolis ankaŭ ĉe la Ĉeĥa Radio, ekz.: http://www.rozhlas.cz/mozaika/hoste/_zprava/733429 Jam antaŭe Brněnská televize ("Brna televido") invitis Marek BLAHUŠ kaj la 30-an de marto en sia programo Vlna z Brna ("Ondo el Brno") aperigis 16-minutan intervjuon pri esperanto. Ĝi spekteblas ĉe http://tinyurl.com/ondoelbrno (sub la bildo eblas elekti subtekstojn en esperanto).

Komencaprile Marek BLAHUŠ, Mirek HRUŠKA kaj Aleš TOMEČEK kunlaboris ĉe Sabla Printempo en Písek, sekve de ĝi en Prago Daniel MRÁZEK subskribis nome de ĈEJ kondolencon pro la tiam okazinta pola aviadila akcidento. Komencmaje 2 ĈEJ-anoj ĉeestis renkontiĝon de la ĉeĥa IKUE-sekcio en Žirovnice kie inaŭguriĝis libro de Max KAŠPARŮ en esperanto-traduko de Marek BLAHUŠ. Fine de majo Marek kaj Jiří GALUŠKA ĉeestis la Tutslovakan renkontiĝon en Trenčianské Teplice. En marto Mirek HRUŠKA prelegis en mezlernejo en Svitavy, aprile Dan MRÁZEK pro neeblo forflugi grekien gastis ĉe esperantistoj en Vieno, en aprilo kaj junio Marek BLAHUŠ vizitis esperantistojn en Francio kaj Pollando. En la konkurso "Monato de Vikipedio" de E@I partoprenis 3 ĈEJ-anoj. Retpaĝaro de ĈEJ troviĝas ĉe http://cej.esperanto.cz/

8. KALENDARO DE E-ARANĜOJ EN ĈEĤIO KAJ ORGANIZITAJ DE ĈEĤIO
2010-06-12: Muzea nokto en Svitavy – vidu apartan alineon

2010-06-17/20: la 9-a TREP (Turisma Renkontiĝo en Plasy). Plasy u Plzně, Inf. Stanislav Pech esperantoplzen@centrum.cz

2010-06-20: Tradicia renkontiĝo de ĉeĥaj, polaj kaj slovakaj esperantistoj sur la pinto de la monto Ĉantorio. Inf.: suchanekj@seznam.cz

2010-06-24/27: Internaciaj lingvaj kaj turismaj tagoj, Studený (Lužické-montaro). Inf. N. Karbe nokosaksio@googlemail.com La kapacito jam elĉerpita

2010-07-04/17, 07-18/31, 08-01-01-13. Tri etapoj de Somera Esperanto-tendaro en Lančov ĉe Vranov-valbaraĵo. Info: www.set-lancov.cz aŭ info@lancov.cz

2010-07-11/25: Flugkaravano al Kubo lige al la UK. Plena. Ne plu eblas aliĝi.

2010-08-13-15: Lanĉov, Renkontiĝo de iamaj SET-partoprenintoj kaj amikoj de Someraj Esperanto-tendaroj. Info: info@set.lancov.cz

2010-09-05: Postferia renkontiĝo en Tábor. Organizas EK Písek. Info: pisek@esperanto.cz

2010-09-17/19: seminario "50 jaroj de E-rondeto Amikeco" en Česká Třebová, Kultura centro Česká Třebová, restoracio "Na horách". Ene de ĝi prelegoj, instaligo de memorŝtono, amuzprogramo kaj komputilkleriga seminario. Organize partoprenos Urba muzeo en Česká Třebová. Inf.: Jana Křížková,  jk.esperanto@seznam.cz, aŭ ladislav.kovar@tiscali.cz

1010-09-24/26 (-28): Konferenco de ĈEA en Poděbrady kun la eblo de plilongido je 2 tagoj (vidu pli supre). Info: http://www.esperanto.cz/cs/akce/konference-ces-299.html aŭ ĉe cea.polnicky@quick.cz

2010-11-18/21: KAEST (Konferenco Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko), post 12 jaroj de regulaj okazaĵoj en Ĉeĥio kaj antaŭe alterne en Slovakio kaj Ĉeĥio, ĉi-foje denove KAEST revenas al Slovakio, Modra-Harmónia. Info: www.ikso.net/kaest aŭ petro@ikso.net (Petro Baláž)

2010-12-11: Antaŭkristnaska renkontiĝo en Písek. Info: pisek@esperanto.cz

2011-05-07/14: La 63-a IFEF-kongreso, Liberec, Kongresa centro Babylon. Inf.: ladislav.kovar@tiscali.cz, aŭ www.ifef.wz.cz.

Ĉu vi ne trovis vian aranĝon ĉi tie? Ne kulpigu nin, sed sendu la informon pri ĝi al chrdle@kava-pech.cz. Nee eblas envicigi aranĝon, pri kiu ni ne scias.

Atentu, ke en ĉi tiu kalendaro estas envicigitaj nur eventoj okazontaj en Ĉeĥio aŭ organizata de Ĉeĥio. La plej kompletan kalendaron de Esperanto-eventoj en la tuta mondo, sed ankaŭ plurajn utilajn informojn, vi trovos ĉe www.eventoj.hu